

Brazilei


ĵaro 3 n-ro 12 2009

UNUSILABO

Stilo-evoluo
ĉe Zamenhof

**Vivian
Magalhães**
Parolo de spertulo





Karolo Darvino
[1809 - 1882]

*Tiuj homoj havas
ion komunan ĉi-jare:*



Ludoviko Brajlo
[1809 - 1852]

*Ili estas omaĝindaj
jubileantoj.*



L. L. Zamenhof
[1859 - 1917]

*Invitu viajn lernantojn
memorfesti ilin...*

*Vi havos multon pri kio
paroli esperante!*



Enhavo

Parolo de spertulo Vivian Magalhães	06
Lecionoj kun iom da poezio Unusilaboj	20
Stilo-evoluo ĉe Zamenhof Floriano Pessoa	31
Spite prifajfon	14
Kiel Diri?	16
Nova 2010 - Tendumado	28
Motivado de la instruado de Esperanto: kial tiom da fiaskoj?	37
Eldiroj	04
Karaj geïnstruistoj	05
Reteja mondo	13
Pliriĉigu vian vortprovizon	29

ilei

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Faka asocio pri instruado aliĝinta al
Universala Esperanto-Asocio (UEA)
www.ilei.info



Provizora Sekciestro: Joseo Tenorio

Sekretariino: Conceição Rodrigues

Kasisto: Joel Afonso Francisco

Brazila Sekcio de ILEI funkcias
ĉefe per interreto ĉe la adreso

www.ileibr.org

geinstruistoj@ileibr.org

biblioteko@ileibr.org

butiko@ileibr.org

Poŝtadreso por korespondado

Rua Francisco Garcia, 168 - Itaquera
08230-560 São Paulo, SP - Brazilo
Telefono: (11) 2055-7978

Brazilei

aperas kvarfoje jare kaj estas eldonata
de Brazila Sekcio de ILEI

ĉefredaktanto: Joseo Tenorio

grafikaranĝo: Joseo Tenorio

kontakto: revuo@ileibr.org

kontrollegantoj: José Dias Pinto,
Eurico A. Ribeiro, Conceição Rodrigues

Kunlaboris en tiu ĉi numero:

Floriano Pessoa, Josias Barboza
kaj Paulo Sergio Viana.

Eldiroj

“Ni ne havas super-
fluaĵajn laborfortojn por ripeti
projektojn, kiujn aliaj jam
bone faras. Sed restas multaj
kampoj kie ni mem devas
elpaŝi je internacia skalo.”



Stefan MacGill, *prezidanto de ILEI*
komente pri la celaro de la nova
guidantaro de la ligo. IPR/093, p. 3

“Deĉifri informojn en
fremda lingvo povas esti
tiel malfacile por lernantoj,
kiel por interpretistoj
estas kompreni kaj traduki
la ŝercojn de Billy Crystal okaze
de ceremonio por livero de Oscar-
premio.”



Vivian Magalhães, *Brazila lingvo-*
instruinstino en sia libro “Cent
lecionoj sen enuo”, p. 83.

“Oni ofte aŭdas
– efektive temas pri fakto
vaste rekonata – ke la
literaturistoj grave kontribuis
al la evoluigo de Esperanto.

Mi ne kontraŭstaras tion: la literaturistoj
ja grave kontribuis – sed tio ne signifas
ke ilia kontribuo estis pozitiva.”



Anna Löwenstein, *brita verkistino*
komente pri enkonduko de novaj
vortoj fare de literaturistoj. Revuo
Esperanto n-ro 1229 (10) p. 195.



Antaŭen, kuraĝe kaj sentime

Speciale por tiu ĉi n-ro intervjuiĝas aŭtorino de libro pri ludaj aktivadoj celanta instruistojn de fremda lingvo. Portugallingvanoj povos iom pli konatiĝi kun ŝia laboro per vizito al ŝia retejo (vidu adreson fine de la intervjuo) aŭ per aĉeto de ŝia verko ankaŭ ĉe nia libroservo (vidu adreson en la kolofono).

Kio komuna estas inter unusilabaj poemetoj kaj la esperanta gramatiko? Legu sur p. 16 raporton pri kiel poezie esplori la radikaron, afiksaron, prepoziciojn kaj aliajn gramatikaĵojn. Fine de la raporto estas didaktika projekto pri kiel regali viajn lernantojn per tiaj unusilabaĵoj.

Floriano Pessoa memorigas pri kelkaj apartaĵoj en la lingva uzado de Zamenhof (p. 27), kaj Paulo Viana atentigas la legantojn pri kelkaj falsaj amikoj, el la portugala, dum legado aŭ skribado de esperanta teksto. (p. 35).

La esperanta leĝo-propono de la brazila senatano plu evoluas en la parlamentejo, por surprizo de la enlandaj movadanoj, kiuj de multaj jaroj revadas pri tio, sed dume forgesis sin prepari por esti utilaj al tiu unika okazo oficiale enkonduki la lingvon en la lernejojn (p. 33).

Agrablan kaj pensigan legadon!

Antidoto kontraŭ enuo

Freŝdate mi trovis en interreto libron, kies titolo vekis mian atenton: *“Cem Aulas Sem Tédio - Sugestões Práticas, Dinâmicas e Divertidas Para o Professor de Língua Estrangeira”* (Cent lecionoj sen enuo - praktikaj sugestoj, interagaj kaj amuzaj, por instruisto de fremda lingvo). La aŭtorinoj, Vivian Magalhães kaj Vanessa Menezes Amorim, estas instruistinoj pri la angla, sed ili havis la bonan ideon skribi la libron en la portugala, tiel ke ĝi povas esti utila ankaŭ al aliaj instruistoj de FL. Ni ne nur akiris ekzempleron de la libro, por ĝin taksii, sed ankaŭ esprimis la deziron intervjui unu el la aŭtorinoj, kiu afable akceptis la inviton.

Estas lernantoj kun mirinda lerteco por lerni lingvojn. Kelkaj sukcesas lerni eĉ solaj, per spektado de filmoj aŭ per legado de klasikuloj en la FL. La plej multaj tamen bezonas ian helpon aŭ instigon. El multaj rimedoj ekzistantaj por iom mildigi la suferon de tiuj lernantoj, aŭ ilin entuziasmigi, la menciata libro estas unu tia. Kontraŭ la elreviĝo, ke la lernanto ne sukcesas memori pri ĉio necesa por lerni fremdan lingvon, la aŭtorinoj de *“Cent lecionoj sen enuo”* proponas amuziĝon kiel antidoton.

Ni invitas la esperantajn instruistojn iom konatiĝi, portugale, kun la laboro de la edukistinoj en la retejo <www.linguaestrangeira.com.br>. Antaŭe tamen malfermu vian lernoĉambron por ricevi nian ĉi-numeran intervjuatinon.

spertulo

Vivian Magalhães



Vivian Magalhães estas bakalaŭro pri ĵurnalismo, specialisto pri instruado de la angla lingvo kaj magistro pri edukado ĉe PUC/RS. Ŝi studis ankaŭ en Usono, kie ŝi ricevis la altlernejan ateston *“Associate of Arts Degree”* kiel honormerita diplomiganto (Dixie College, Utah). Sukcesis la noton A en la kembriĝa ekzameno pri lingva kompetenteco (angle CPE). Ŝia profesia praktikado inkluzivas laborojn kiel dulingva raportistino, sed plej multe el ŝia “kreema energio” direktiĝis al instruado de la angla lingvo. Kiel lingvinstruisto, en la urbo Porto Alegre, ŝi laboris en Yázigi, Domimium, Kolegio Farroupilha kaj Express English. Nuntempe ŝi gvidas trejnadojn por perfektigo de instruistoj, estras la retejon <www.linguaestrageira.com.br> kaj private lecionas la anglan en Porto Alegre.

Brazilei: *Kiam vi perceptis, ke vi havas inklinon kundividi viajn konojn pri FL en lernoĉambro?*

Vivian Magalhães: Mi komencis gvidi lecionon pri la angla en frua aĝo, 18-jara, kvazaŭ hazarde. Mi revenis el Usono post finstudi en la tiea mezlernejo kaj, bezonante monon por pagi la kurson pri ĵurnalismo, mi decidis gvidi lecionojn pri la angla en tiu lernejo, kie mia fratino estis kunordiganto. Komence, mi laboris ĉefe kun grupoj de infanoj. Ĉar mi mem ŝajnis pli infana ol plenaĝa, mia interrilatiĝo kun la lernantoj estis tre facila kaj rapida. Ĝis nun mi renkontas surstrate personojn, kiuj estis miaj tiamaj lernantoj, kaj ili memoras pri mi. Ili rekonas min kaj vokas min laŭnome! Konsidere al tio, ke jam pasis preskaŭ 30 jaroj, tio igas min tre feliĉa.

Brazilei: *Kiuj estis viaj malplej kaj plej bona leciono pri FL?*

Vivian Magalhães: Mi pensas, ke la malplej bona okazis, kiam mi malpaciĝis kun adoleskanto, kaj li eliris el la ĉambro, tirante la pordon tiel forte, ke ĝi preskaŭ elĉarniris. Per tio mi lernis, ke malpaciĝoj kun lernantoj devas esti solvataj private, ĉar same kiel ni defendas nian aŭtoritatecon, ankaŭ la lernantoj havas ian rolon por defendi antaŭ sia grupo. Se la kontraŭstaro okazas antaŭ la lernantaro, la afero fariĝas pli malbona ol se ĝi okazus en aparta interparolado. Tiu-okaze ĝi certe estis!

Unu el la plej bonaj lecionoj gvidataj de mi okazis dum mia deĵoro kiel anstataŭanto en iu klaso da plenaĝuloj, antaŭ multaj jaroj, kiam mi laboris en Yázigi. Kvankam mi ne konis la klasanaron, nia afineco estis perfekta kaj la leciono fariĝis tre malpeza kaj malstreĉa. La lernantoj senbridigis la langon! Ordinare tia interrilato estas afero kiu estiĝas iom post iom dum kunvivado kun la lernantoj; tial mi pensas, ke mi memoras pri tiu leciono kiel speciala, ĉar tiu interrilato estis tuja. Bedaŭrinde, poste mi devis “redoni” la klasanaron al la ĉef-instruistino.

Brazilei: *Laŭ via opinio, kiuj estas la plej granda defio kaj la plej bona rekompenco por instruisto de FL?*

Vivian Magalhães: Mi pensas, ke la plej granda defio, ĉefe por tiu kiu laboras en ordinaraĵ lernejoj, estas konkeri la respekton de la lernantoj kaj de la administrantoj. Neniam antaŭe instruistoj estis tiel



subvalorigataj kiel ili estas nun: registriĝas multaj kazoj de malrespekto al la instruisto ene de lernoĉambro, kaj plej ofte la salajroj estas malaltaj. La plej bona rekompenco estas kontribui al ŝanĝo en ies vivo. Nur en malmultaj profesioj tio okazas tiel ofte kiel en la nia. Kiu jam ne estis inspirita de bonega instruisto sekvi iun karieron aŭ ekŝati lernobjekton pro merito de sia instruisto? Mi ne scias ĉu iu el miaj lernantoj decidis fariĝi instruisto pro mia influo, sed kiam iu diras al mi, ke li lernis ŝati la anglan pro mi, tio ja estas vera rekompenco.

Brazilei: *“Cent lecionoj sen enuo” jam de pli ol dek jaroj helpas al instruistoj de FL forpeli el siaj lecionoj tiun nedeziratan entrudulon. Por tiuj, kiuj ankoraŭ ne konas vian libron, kiuj estas la unuaj manifestaĵoj de enuo en leciono, al kiuj la instruisto devas esti atenta?*

Vivian Magalhães: Atento funkcias laŭ cikloj, kaj estas dubinde, ke instruisto altiros ĉies tutan atenton samtempe. Sed la ĝenerala distriĝo signas, efektive, ian enuon. Foje tio okazas, ĉar la lernantoj pensas, ke ili jam scias tion kio estas instruata, aliffoje ĉar, male, ili estas tiel baraktantaj, ke ne sufiĉos al ili resti atentaj. Tial nepras, ke la instruistoj lernu trakti la lingvan niveldiferencon de la lernantoj, havigante aktivadojn, kiuj kontentigas ilian malsamajn konnivelejojn. Alia signo de enuo estas la malvigla partopreno de la lernantaro. Entuziasmigataj lernantoj ĉiam tenas siajn fingretojn levitaj, dezirante respondi iun demandon, partopreni iun ludon, veni al la tabulo por solvi iun proponatan defion. Apatia klasanaro, male, ne estas bona signo.

Brazilei: *En via libro estas bela citaĵo de la fama brazila edukisto Paulo Freire “Neniu entuziasmigas neniun, sed neniu entuziasmiĝas sola”. Kiu estas la graveco de ludaj aktivadoj cele al entuziasmigo de lernantoj por regado de FL?*

Vivian Magalhães: Ĉiuj personoj lernas plurajn konceptojn kaj lertecojn dum sia infanaĝo pere de amuzadoj, ludoj kaj ŝajnigoj. Cetere, tiuj

amuzadoj helpas plivastigi la disvolvon de la lingvo, penso, koncentriĝo kaj atento. Se tiaj ludaj aktivadoj venigas tiom da bonfaroj al infanoj, certe ankaŭ plenaĝuloj profitos de tiaj aktivadoj, kiuj stimulas la imagemon kaj kreemon, faciligas ensocietiĝon kaj igas la lernadon pli plezura kaj amuza. Entuziasmigo por lerni lingvon dependas de pluraj faktoroj, sed sendube la fakto, ke la lernanto eksentas la lingvan lerno-medion senstreĉa kaj amika, tio jam estas, laŭ proverbo, “laboro duona”.

Brazilei: *Kelkaj aŭtoroj defendas kunhelpon en ludaj aktivadoj, dum aliaj pledas por iom da konkurado, kiel vi. Meze en tiu ŝnur-tirado restas al la instruisto unu plia malfacila tasko, nome decidi kiam uzi unu aŭ alian metodon. Kion oni devas konsideri en la momento de tiu decido?*

Vivian Magalhães: Tiu estas demando, kiun ni pritraktas jam en la enkonduko de la libro. Ni ne vidas konkuradon kontraŭa al kunhelpado, ĉefe en skipo-ludoj, kie kunhelpo inter la kunludantoj estas nepre necesa por ke unu teamo atingu la deziratan “unuan lokon”. Okaze de individuaj ludoj, nepras eviti, ke pli kapablaj lernantoj ĉiam gajnu, lasante la malpli kapablajn eĉ malpli memfidaj. Cele eviti tion, oni prefere elektu ludojn, kiuj enmiksas ankaŭ la faktoron hazardo aŭ postulas krom-lingvajn lertecojn, kiel bone desegni, havi bonajn ĝeneralajn konojn aŭ havi bonan korpo-esprimadon (por tiuj ludoj pri mimikoj, ekzemple). La saĝeco de la instruisto do devas difini la ĝustan momenton proponi ludon kaj elekti ĉu ĝi estu konkura aŭ ne.

Brazilei: *Kiel eviti, ke ludaj aktivadoj iĝos la ĉefa allogo en lernoĉambro, tirante la intereson de la lernantoj for de la lernata FL?*

Vivian Magalhães: Ludaj aktivadoj devas esti ĉiam rimedo, kaj ne celo. Alidirate: ludoj kaj amuzadoj devas esti direktataj al iu didaktika celo, kontraŭe ilia uzo en lernoĉambro kunteksto fariĝas senkiala, ĉar per ili oni celas, evidente, la lernadon de la lernantoj. Tio estas bone klarigata fine de la lasta ĉapitro de la libro, kiu traktas pri taksado. Kiam iu ludo estas uzata kun difinita pedagogia celo, mi ne kredas, ke ĝi povas tiri la atenton de la lernantoj for de la lernata FL. Male, ĝuste ludado ebligas, ke la lernanto uzu kaj praktiku la cel-strukturojn, helpante al li rilate parkeradon, prononcadon kaj multfoje komprenadon de iu gramatika aspekto.

Brazilei: *Per kelkaj ludaj aktivadoj oni celas instigi la lernantojn al ia kolektiva trankvilo-stato por ke la instruisto povu, finfine, prezenti sian lecionon. Kio povas okazi, kiam la lernantoj perceptos tiun artifikon uzatan de la instruisto?*

Vivian Magalhães: Multfoje nedisciplino estas rezulto de ne elverŝiĝinta energio, ĉefe rilate infanojn. Ju pli junaj estas la lernantoj, do, des pli movoplenaj devas esti la aktivadoj: krom ŝati tion, la lernantoj bezonas multe moviĝi. Mi ne vidas do ludojn kiel artifikon aŭ manovron cele al “bonkonduco” de la lernantoj. Kio efektive okazas de tempo al tempo, estas ia konsento inter la instruisto kaj la lernantoj, simila al “se vi rapide finos tiun taskon, restos tempo por prezenti ludon”. Kaj ili finas plej rapide. Mi ne kredas, ke la lernantoj perceptas tion kiel artifikon por ke ili faru tion kion la instruisto volas. Tiu ideo pri “unue la tasko, poste la distro” estas enhejma afero, kaj instruata al ili ekde infanaĝo.

Brazilei: *La instruisto, kiel vi interese memorigas, havos sukceson, se li instruos ne nur la lingvon, sed ankaŭ utilajn aferojn pere de ĝi. En la praktiko, kiel instruisto de FL povos profiti de ludaj aktivadoj por prezenti al siaj lernantoj, praktike kaj plezure, ne nur didaktikajn enhavojn, sed ankaŭ utilajn?*

Vivian Magalhães: Miaj lernantoj amegas ludon nomatan “Vetu trafe”. Ĝi funkcias tiel: por ĉiu demando, ili devas vetludi je 1 ĝis 50. Se ili trafas la respondon, ili gajnas la kiomon de la vetitaj poentoj. Se ili ne scias aŭ eraras la respondon, ili perdas tiun kiomon da poentoj. Amuzige estas, ke ili devas veti **antaŭ** ol ili scios pri kio temas la demando. Mi miksas demandojn pri sportoj, literaturo, geografio, gazetaj novaĵoj, el ĉio iomete. Alia maniero plivastigi la ĝeneralan kleriĝadon de la lernantoj pere de FL estas prilabori interesajn tekstojn. La libro “*Cent lecionoj sen enuo*” prezentas kelkajn sugestojn pri aktivadoj celantaj legadon kun ludo kaj plezuro.

Brazilei: *Malsame al tiuj publikaj lernejoj, kiuj estas devigataj lerni iun FL (kaj tial bezonas pli da stimulo), lernantoj de privataj lingvokursoj venas en la lernoĉambron ŝajne memstimulataj (pro laboro, vojaĝo aŭ iu alia motivo), preferante “serioze studi” la novan lingvon ol ludi en lernoĉambro. Kiel la instruisto devas uzi ludajn aktivadojn kun tiaj lernantoj?*

Vivian Magalhães: Kiel mi diris antaŭe, ju pli juna estas la lernanto, des pli li emas ludi kaj moviĝi. Plenaĝa lernanto, efektive, foje preferas ian pli “seriozan” lernadon. Mi jam havis plenaĝajn lernantojn kiuj ne ŝatis ludojn, same kiel mi havis (kaj havas) plenaĝajn lernantojn kiuj venas al la leciono stresigintaj kaj amegas iom ludeti por malstreĉiĝi. Mi pensas, ke la saĝeco de la instruisto fine difinas kiu estas la plej bona pritrakto por ĉiu kursanaro. Cetere, unu kursanaro neniam similas alian; tial, kiam temas pri instruado, malofte oni povas prezenti ĝeneralaĵojn.

Brazilei: *Pri la uzo de teknologio en lernoĉambro, vi speciale atentigas pri tio, ke instruistoj ne estos anstataŭataj de teknologio, sed kiuj ne scios profiti ĝin, tiuj riskos esti anstataŭataj de aliaj kiuj scipovas. Tio estas averto tre ĝena por instruistoj kaj edukistoj, kompreneble tiuj senentuziasmaj kaj malinformataj. Krom la libro, kiujn aliajn laborojn vi disvolvas por entuziasmigi kaj helpi instruistojn de FL?*

Vivian Magalhães: La retejo <www.linguaeStrangeira.com.br> estas mia ĉefa kontaktilo kun la instruistoj, kelkaj el ili legantoj de nia libro, aliaj ne. Mi opinias tiel interesa kaj profita tiun kontakton, ke mi verkis mian magistran disertaĵon pri retejoj el instruistoj por instruistoj, kiel tiu mia. Mi malkovris, ke nia profesia klaso troviĝas inter tiuj kiuj plej multe kundividadas informojn kaj laboraĵojn. Teknologio faciligas eĉ pli tiun interŝanĝon, kiu miaopinie variigas kaj multe pliriĉigas nian laboron.

Brazilei: *Ni tre dankas, ke vi akceptis nian inviton dividi iom de via laboro ankaŭ kun la esperantaj instruistoj.*

Vivian Magalhães: Ĝi estis plezuro.

Wikipedio: ĝenerala kaj populara

La 15an de oktobro 2009, la Esperanto-Wikipedio atingis 120 000 artikolojn. La informon dissendis la germana vikipediisto Wunsch-Rolshoven, kiu tiel komentas pri la utilo de tiu reta servo por la esperanta komunumo: *“Unue ĝi servas kiel leksikono – fakte la unua ĝenerala leksikono dum la ĝisnuna 122-jara historio de Esperantujo. Due per tio ĝi subtenas ankaŭ la terminologian diskutadon kaj laboron. Trie nia vikipedio tre klare montras al la ekstera mondo, ke Esperanto vivas ĉiutage kaj estas daŭre uzata.”*



Por plua evoluado de vikipedio, li alvokas ĉiun spertan esperantiston kontribui, almenaŭ unufoje en la monato, per eta teksto aŭ korektado de jam skribita artikolo. Se vin interesas redaktado en tia medio, vizitu la retadreson <<http://eo.wikipedia.org/wiki/Helpo:Enhavo>> por legi iom pli pri la temo.

Fonto: www.esperantoland.org



“Esperanto ensino”

Estas la nomo de la plej nova enlanda komunumo celanta instruemulojn pri Esperanto, kreita de Sandra Alencar (Salenka) la 27an de marto 2009. Al ĝi jam membriĝis 96 interesigantoj pri la temo. Por pliaj informoj, portugale, vizitu la retadreson <<http://esperantoensino.ning.com>>.



Sen. Cristovam Buarque

Spite prifajfon

La Komisiono pri Edukado de la Brazila Senato aprobis la 15an de septembro 2009 projekton, per kiu oni proponas instruadon de Esperanto en la enlandaj mezlernejoj kiel nedevigan lernobjekton. La projekto, de aŭtoreco de la senatano Cristovam Buarque (Laborista-Demokrata Partio), iros al la Deputita Ĉambro kaj, se aprobita, la lernejoj havos tri jarojn por adaptiĝi al la leĝo, kiu antaŭvidas devigon de la instruado de la lingvo, se ĝin pravigos la ekzisto de intereso fare de la lerneja komunumo, post tiu eksperimenta periodo.

Laŭ noto en la senata novaĵagentejo, du el la senatanoj – Gerson Camata (Partio de la Brazila Demokrata Movado) kaj Roberto Cavalcanti (Brazila-Respublika Partio) voĉdonis kontraŭ la projekto. Laŭ la unua, temas pri “senutila projekto”, ĉar tiu, kiu lernos Esperanton ne havos kunparolanton por praktiki la lingvon.

Pri la novaĵo raportis unu el plej prestiĝaj enlandaj magazinoj, *Época*, kiu taksis la projekton “nekutima”, antaŭ tiom da aliaj pli urĝaj projektoj atendantaj pritakson de la senatanaro. Kiel kutime, esperantistoj amase vizitis la magazinan retejon cele lasi siajn optimismajn komentojn apud kreskantaj nefavoraj komentoj de neesperantistaj vizitantoj.

James Piton, UEA-Ĉefdelegito por Brazilo kaj Komitatano A, opinias, ke la magazino modere pritraktas la temon, ĉar la aŭtoro de la leĝoprojekto estas tre prestiĝa politikisto. Laŭ Piton, oni atendu plej malfavorajn reagojn, kiam la novaĵo atingos aliajn enlandajn publikigaĵojn.

Pri atakoj kontraŭ Esperanto, Adonis Saliba, iama komisionestro por Ameriko kaj pioniro pri kreado de esperantaj komputilaj kursoj,

per retmesaĝo kun tre ekvilibrigaj argumentoj, atentigas la enlandanojn pri tio, ke la komunumo travivas neordinaran momenton, malsaman kaj for de nia kaŝejo. Interalie, li memorigas pri la **Manifesto de Prago** kiel sekura gvidilo por tiaj momentoj, kiam oni bezonas prezenti al la publiko konvinkajn argumentojn bazitajn sur faktoj kaj ne sur personaj kredaroj.

Unu el la komentintoj de la artikolo, Mário Takemoto, el la urbo Sanpaŭlo, i.a. skribis "(...) *Kun la konvena respekto al Esperanto, se cifere paroli, kiom da instruistoj estos preparitaj?*" Malfacilas trovi kontentigan respondon ene de la esperantista komunumo. Indas eĉ suspekti pri jena ebleco: se la projekto estiĝis ekster la komunumo, plej probable ankaŭ la solvo kuŝas ekster ĝi.

Laŭdire, nenio estas pli pova ol ideo, kies plenumtempo alvenis. Nin koncerne, aldonindas: nenio estas pli timiga ol vidi ideon, pri kies aprobo la esperantistaro mem fajfis, antaŭeniri spite kaj defie!

Publikigita en <http://ileibr.org/brazilei>

Nova retejo

Tiu ĉi supran kaj aliajn artikolojn vi legas en la nova retejo de Brazilei, kiu migris el la enhavadministra sistemo Xoops al tiu de WordPress, ankaŭ liberuza.

Nur malpli ol 10% el la enhavo de la antaŭa retejo estis transprenita al tiu nova. Novaj transprenoj okazos poste, laŭ disponebleco de la redaktanto. Dume ni atendas vian viziton aŭ sendon de kontribuajfoj.

Laste, ni memorigas, ke pdf-versio de la revueto estas senpage abonebla ĉe <http://ileibr.org/brazilei>.



Prelege okaze de la 4-a Kongreso de Esperanto de la Ŝtato Sanpaŭlo, en la urbo Bauru oktobre 2009

Tradukado estas trejnado por malfiero: ofte ne eblas trovi tute kontentigajn transmetojn de unu lingvo al alia, kaj tradukanto devas ĉiam prepariĝi por kritikoj. Tamen, ĝi estas grava, necesa kaj alfrontenda tasko, ĉar verŝajne la mondo neniam havos unu solan lingvon. Koncerne Esperanton, des pli grave, ĉar interalie nia lingvo celas servi kiel ponto inter kulturoj.

La ĉiama dilemo staras inter *fideleco* kaj *natureco*: tradukon oni devas legi kvazaŭ originalaĵon, sed sen perfido. Kiel atingi tion? Nur per iom-post-ioma, obstina alproprigo de la spirito de ambaŭ lingvoj, flanke de la tradukanto. Por tio ne ekzistas ebla miraklo – nur konstanta, atenta kaj amplena aktiva uzado de tiuj lingvoj. Alivorte: ĉiutage legi, paroli kaj aŭskulti ties vortojn, frazojn, parolturnojn kaj proprajn dirmanierojn.

Kiam oni konsideras la malfacilan arton traduki, plej ofte oni tuj pensas pri *literatura*, *beletra* tradukarto. Oni pensas pri la altvaloraj prozaĵoj kaj versaĵoj de la tutmonda literaturo. Prave. Ĉi tiuj estas la pinto de la defio: Esperantigi paĝojn de Victor Hugo, Ŝekspiro, kaj Tolstoj ja alportas respondecon proporcian al la graveco de tiaj geniuloj. Ĝi estas tasko por malmultaj talentuloj – se eble same geniaj. Tamen, ekzistas alia dimensio de la arto traduki, kiu restas iom flankenlasata, kaj koncernas la vastan Esperantistan popolon, kiu ne pretendas geniecon aŭ apartan lingvan talenton. La ordinara, ĉiutaga uzanto de nia lingvo, sen konsidero pri altaj artaj intencoj, ofte stumblas ĉe ĉiutagaj esprimoj, vortoj kaj frazoj, foje tute nemalhaveblaj, se oni ja konsideras Esperanton kiel vivantan, pulsantan lingvon! Mi celas la foje komikajn, foje kuriozajn, foje praktikajn parolturnojn, kiuj karakterizas la ĉiutagan uzadon de ĉiu lingvo. Post la elementa kurso de Esperanto, estas tempo eklerni tiajn esprimojn. Ili estas senfina amaso! Ni devus helpi niajn komencantojn (ankaŭ la eternajn...) trovi solvojn por tiaj sukaj dirmanieroj por transmeti ilin el la gepatra lingvo al Esperanto.

Ĉi tiu modesta prezento estas nura provo stimuli al tia – se tiel diri – *populara tradukado*. Evidente, la kvanto da tiaj esprimoj estas senfina, se oni konsideras, ke pitoreskaj diraĵoj kreiĝadas konstante en vivantaj lingvoj. Ĉi tie ni listigos nur kelkajn, kunigitajn sen speciala kriterio. Mi proponas portugallingvajn vortojn, parolturnojn kaj frazojn. Fine de la teksto vi trovos ilin tajpitaĵoj per etaj litertipoj (por ke vi sentu vin motivataj trovi viajn proprajn tradukojn, kaj nur poste kompari kun miaj – eble vi atingos pli bonajn rezultojn!).

* * *

Ni komencu per kelkaj laŭliteraj tradukoj, kiujn indas aĝustigi, inter portugallingvanoj. La ĝustan formon mi metas inter parentezoj:

— *Participar do congresso*: partopreni de la kongreso (partopreni en la kongreso, aŭ la kongreson).

— *Estou preocupado com você*: mi estas priokupita pri vi (mi estas maltrakvila, aŭ zorgoplena pri vi).

— *Ele vestiu uma camisa verde*: li vestis verdan ĉemizon (li surmetis verdan ĉemizon, aŭ sin vestis per verda ĉemizo).

— *Estou curioso para assistir o filme*: mi estas kurioza spekti la filmon (mi estas scivolema spekti la filmon).

— *Ela estava extremamente elegante*: ŝi estis tro eleganta (ŝi estis treesge eleganta).

— *Pedro ofereceu à mãe um belo presente*: Petro oferis al sia patrino belan donacon (Petro donis, aŭ proponis, al sia patrino belan donacon).

— *Aquele deve ser o carro de João*: tiu devas esti la aŭtomobilo de Johano (tiu certe estas la aŭtomobilo de Johano, aŭ tiu eble estas la aŭtomobilo de Johano).

— *É tarde, não vou mais à aula*: estas malfrue, mi ne iros pli al la leciono (mi ne plu iros al la leciono, aŭ mi jam ne iros al la leciono).

— *Entre Paulo e Marta, ela é a mais esperta*: inter Paŭlo kaj Marta, ŝi estas la plej lerta (inter Paŭlo kaj Marta, ŝi estas la pli lerta).

— *Fracassei na prova*: mi frakasis je la ekzameno (mi fiaskis je la ekzameno).

— *Diante da ameaça, ele foi correndo estudar a lição:* post la minaco, li kuris por studi la lecionon (post la minaco, li rapidis studi la lecionon).

— *O novo curso vai começar em janeiro:* la nova kurso komencos en januaro (la nova kurso komenciĝos en januaro).

— *Por causa do mau tempo, pensei que ele não chegaria:* pro la malbona tempo, mi pensis, ke li ne alvenus (pro la malbona vetero, mi pensis, ke li ne alvenos).

RIMARKO: plej multaj Esperantistoj en la tuta mondo nuntempe preferas la formojn “peti al...” kaj “demandi al...”, malgraŭ la uzado de Zamenhof: “peti –n...” , aŭ “peti de...” kaj “demandi –n...” , aŭ “demandi de...”. Eble estus tro severe konsideri la unuajn formojn kiel erarajn, sed sendube la Zamenhofaj estas pli klaraj kaj logikaj.

Nun mi proponos al vi ĉiutagaĵojn en la portugala lingvo. Klopodu mem trovi bonajn solvojn:

1. *Bode expiatório*
2. *Lua de mel*
3. *É a pura verdade!*
4. *Não estou nem aí!*
5. *Conversa fiada*
6. *Gorjeta*
7. *Quando começou a aula, ele “se mandou”.*
8. *Disputar uma vaga*
9. *Um pouco de chuva não fará mal.*
10. *Morrer de inveja*
11. *Estou abusando da sua bondade.*
12. *Engarrafamento de trânsito*
13. *Relógio à prova d’água*
14. *À prova de fogo*
15. *Bom senso*
16. *Crachá*
17. *Osso duro de roer*
18. *Com a boca na botija*

19. *Pagar o pato*
20. *Ficar sem graça*

* * *

Sekve, mi proponas al vi proverbojn, kiuj kolorigas nian babiladon, kaj havas precizajn tradukojn en Esperanto. Provu, antaŭ ol legi la jam akceptitajn tradukojn:

21. *De noite todos os gatos são pardos.*
22. *Se os olhos não veem, o coração não sente.*
23. *Saco vazio não pára em pé.*

Laste, por kontentigi tiujn, kiuj amas beletron, jen defio alfrontita de du el niaj plej talentaj tradukistoj:

24. *Meu pai explodiu de rir, minha mãe rebentou de raiva e de aflição, e todos estavam embasbacados.* (“Esperanto sem Mestre”, tradukekzerco de Porto Carreiro Neto.)


25. *Dona Dionóra, que tinha belos cabelos e olhos sérios, escutou aquela resposta, e não deu ar de seus pensamentos ao pobre camarada Quim.* (“A Hora e Vez de Augusto Matraga”, de Guimarães Rosa, traduko de Leopoldo Knoedt.)

1. Propieka kapro. 2. Mieliluno. 3. Ĝi estas la pura vero. 4. Mi fajfasi
5. Babilado, babilado. 6. Trinkekzercado. 7. Kiam la leciono komenciĝis, li
pafis sin for. 8. Konkuri por vako. 9. Iom da pluvo ne malutilos. 10.
Krevi de envio. 11. Mi trouzas vian bonecon. 12. Trafikstopiĝo. 13.
Akvoimuna, akvoeltena horloĝo. 14. Fajroeltena. 15. Prudento. 16.
Surbrusta identigilo. 17. Osto en la gorĝo. 18. Ĉe la freŝa faro. 19. Pagi
por fremda festeno. 20. Embarasigi. 21. Kiam nokto vualas, ĉiuj koloroj
egalas. 22. For de la okuloj, for de la koro. / Antaŭ okuloj ne staras,
doloron ne faras. 23. Sako malplena sin rekte ne tenas. 24. Mia patro
eksplodis de ridado, mia patrino krevis de kolero kaj afliktiĝo, kaj ĉiuj
estis konfuzitaj. 25. Sinjorino Dionora, posedanta belajn harojn kaj
okulojn seriozajn, aŭkultis tiun mesaĝon kaj ne tralasis eĉ bloveton
de siaj pensoj al la povra servisto Kim.

Lecionoj

Vek'
per
kok'
el
kort' —
sent'
de
ĝu'
pro
ven'
de l'
tag'.

(Roberta Haianon)



kun iom da

de
hund' —
ven'
de
knab'
kun
pec'
da
pan'
en
man'.

(Maria Fujimoto)

P O E Z I O

Sufiĉas rapida trarigardo sur teksto-paĝo de iu esperanta libro aŭ revuo por ke ni perceptu kiom multnombraj estas unusilabaj vorto-radikoj en Esperanto.

Danke al tiu rimedo elpensita de la kreinto de Esperanto, por forigo de la lasta vokalo ĉe substantivoj, tiaj vortoj tiras la atenton de poeziamantoj al interesa formo de poemo, nome unusilaboj.

Laŭ difino de **Diderto Freto**, brazila poeto kiu la unua aperigis tutan verkon kun specimenoj de tia poeziaĵo, la ĉefaj karakterizaĵoj de la nova poemo estas “*monosilabaj versoj, sen verboj, sen adjektivoj, sen pluralo, sen akuzativo kaj sen afiksoj*”. Tamen la uzado de la afiksaro (prefiksoj kaj sufiksoj) estas permesata kaj ege bonvena kiel radiko.

Ni diversmaniere esprimas ideojn: per gestoj, muziko, skulptado, pentrado kaj plej ofte per vortoj. Koncerne vortojn, ni povas proze aŭ verse komuniki niajn sentojn. Plaĉas al ni aŭdado aŭ legado de frazo kia:

“Mi sentas la povon de Dio, kiam mi vidas la brilon de la suno dum la tago kaj la brilon de la steloj dum la nokto”.

Tiu sama ideo tamen montriĝas pli plaĉa kaj kortuŝa, kiam la vortoj poezie aranĝiĝas en versoj:

*Bril' / de l' / sun' / post / bril' / de l' / stel' — / sent' /
de / mir' / pri l' / pov' / de / Di'.*

(Maria Fujimoto)

Aldone al la beletra valoro de tiaj unusilabaj poemoj, indas mencii tiun didaktikan. Per ekzercado de tiaj poemetoj, krom lerni bone distingi radikon meze de vorto-kunmetoj, la lernantoj havos la okazon ekuzi prefiksojn kaj sufiksojn kiel memstarajn vortojn; ili ankaŭ ekregos la bonan uzadon de prepozicioj.

Viv'
sen
Di' —
nokt'
sen
lun'
tag'
sen
sun',
voj'
sen
cel'.

(Yasuharu Fujimoto)

Iam estiĝis favora okazo proponi verkadon de tiaj unusilabaj poemoj. La lernantoj kuraĝe akceptis la defion, kiun mi dividis je du partoj: en la komenca parto de la verkado (kiun mi nomis ‘**semado**’), mi mem verkis la enkondukajn unusilabojn por ke ili kompletigu la versaron; en la dua parto (kiun mi nomis ‘**rikolto**’), la poemetoj estas de ilia aŭtoreco mem. La lernantoj tiel multe entuziasmiĝis, ke en la fino ni kompilis pli ol cent da tiaj unusilabaj poemetoj!

Danke al tiu ekzercado, la lernantoj, dum kelkaj monatoj, diligente esploris la lingvon. Ili iom pli atentis la vortojn, lernante bone distingi radikojn, multe zorgis pri la uzado de prepozicioj kaj eksentis la esprimeblon de la afiksaro. Ilia poemaro montriĝis ne nur didaktike efika, sed ankaŭ en kelkaj okazoj poezie ĝuinda.

Sekvas kelkaj specimenoj:

Unu el la lernantinoj, Roberta Haianon, unusilabe memorigas nin pri la ĝuo de legado:

Hor' / de / pac' — / leg' / en / sol' / sen / lim' / sen / bru' / sen / lac'.

[Jen tre trafa uzo de la radiko ‘sol’ fare de komencanto! Ordinare oni ĝin uzas nur adjektive.]

Per sia poemo, s-ino Maria Fujimoto vidigas nin, ke en te-cerimonio enestas multe da arto:

Fest' / de / te' — / er' / de / art' / kaj / dank' / pri' / viv'.

[Interesa estas la apero de la neordinara sufikso ‘er’ pere de komencanta plumo.]

Alia lernantino, Iveth Kusano, kredigas nin, ke la tutmonda ronda familio kantata de Zamenhof eblas:

Sen
vi
jen
viv'
sen
ind'
sen
fort'
sen
lum'
sen
glor'.

(Júlio Nolló)

Rus' / pol' / franc' — / ebl' / de / viv' / kun / plen' / de / am' / sur / ter'.

[Per tia ekzercado la lernanto ekĝuas la esprimopovon de la lingvo: ne mirige, se poste la lernanto ekdiros 'mi faros tion laŭ mia eblo', anstataŭ la ordinara 'laŭ mia ebleco'!]

S-ro Júlio Nolio invitas nin ĝui la bonfaron pri la kono de dia leĝaro:

Kon' / pri / leĝ' / de / Di' — / pur' / en / pens' / kaj / pac' / en / kor'.

[Jen alia interesa eltrovo: kiam lernanto perceptas, ke 'puro' estas mallonga formo de 'pureco', li ne nur ekkomprenas plibone la uzadon de la sufikso 'ec', sed ankaŭ akiras memfidon por decidi kiam uzi la mallongan formon]

S-ro Yasuharu Fujimoto instruas nin pri la bonefiko de survojaj ŝtonoj:

Ŝton' / sur / voj' — / prov' / de / Di' / al / hom' / kun / cel' / al / pac'.

[La plej interesa afero koncerne tiujn unusilabojn estas la jeno: por ke la aŭtoro de tiu poemo prezentu ĝin tia kia ĝi legeblas supre, la poemo unue devis prezentiĝi, skribe aŭ mense, tiel: 'Ne gravas la ŝtonoj sur nia vivovojo: ili estas provoj, kiujn Dio metas antaŭ nin por vidi ĉu ni havas sufiĉe da volforto por konkeri pacon'.]

S-ro Kiyotaka Asai memorigas gepatrojn, ke la plejan bonon oni heredigas ne per vortoj, sed per agoj:

Vort' / de / saĝ' / al / fil' — / ag' / de / paĉj' / kaj / panj' / por / bon'.

Atentindas la uzado de la vortoparo 'paĉjo / panjo' responde al la plej ordinara 'patro / patrino', metrike ne taŭga por la poemo.]



Ĉiuj personoj menciataj en tiu ĉi artikolo estas aŭ jam estis lernanto en la kurso de Esperanto kiu okazas ĉiumarde en la subsidejo de Oomoto, en la urbo Sanpaŭlo.

Didaktika Projekto

Unusilaba poemeto

Celoj

- * Produktado de teksto versoforma.
- * Esplorado de lingvaj eroj, gramatikaj kaj leksikaj.

Enhavoj

- * Unusilaba radikaro
- * Afiksaro
- * Prepozicioj

Celpubliko

Ĉiaj lernantoj post konatiĝo kun plej multaj afiksaro kaj prepozicioj

Tempodaŭro

Minimume dum dek vicaj lecionoj. Tiukaze, la instruisto proponas skribadon de unusilabaj versaroj kiel hejmtaskon kaj korektas kelkajn el ili sur la tabulo komence de ĉiu leciono. La ceterajn poemetojn la instruisto portu por korekti hejme, cele ne eluzi multe da tempo de la leciono por tiu tasko.

Bezonata materialo

- * Fundamenta esperanta vortaro
- * Listo de afiksaro
- * Listo de prepozicioj



DISVOLVO

* Unua paŝo

Kompilu, aŭ mem verku, kelkajn unusilabajn poemetojn. Aparte notu interesajn verserojn aperantajn en ili. Sur paperfolio aranĝu listojn de la afiksaro (prefiksoj kaj afiksoj), prepozicioj kaj aliaj gramatikeroj unusilabaj: *kaj, pli, sed, aŭ* k.s. Pretigu kopion ankaŭ de la elektitaj unusilabaj poemetoj por disdoni al la lernantoj.

* Dua paŝo

Eluzu unu tutan lecionon por montri specimenojn de tiaj poemetoj. Disdonu kopion de la elektitaj unusilabaĵoj. Klarigu pri ilia farado kaj komentu pri interesaj uzoj de iuj gramatikeroj. Poste petu, ke la lernantoj vice legu la unusilabajn poemetojn.

* Tria paŝo

Disdonu la listojn de la afiksaro kaj prepozicioj. Petu, ke la lernantoj parkere listigu kelkajn unusilabajn radikojn (skribu la vortojn sur la tabulo).

* Kvara paŝo

Proponu, ke la lernantoj provu skribi unusilaban poemeton helpe de la surtabula vort-listo kaj de tiuj listoj pri afiksaro kaj prepozicioj. Skribu la rezultojn surtabule kaj komentu pri la interesaj vortuzoj.

* Kvina paŝo

Se vi sentis, ke al plej multaj el la lernantoj plaĉis la ludo, proponu daŭrigon de la verkado kiel hejmtaskon, por ĉiu leciono. Klarigu, ke per tiu skribado oni ne celas aliigi lernantojn al poetoj, sed nur lingve kaj gramatike ekzercigi ilin. Pri versaranĝo, postulu nenian formon.

Komence plej gravas, ke la verkantoj libere surpaperigu siajn sentojn. Poste, se vi trovos konvene, proponu, ke ili aranĝu la poemeton en iu difinita verso-formo: dek-silaba, dudek-silaba, kvardek-silaba...

* **Sesa paŝo**

Pri la vortstoko de unusilabaj radikoj, estas du sugestoj: se vi uzas lernolibron, vi povas proponi, ke la lernantoj uzu nur la koncernajn unusilabajn vorto-radikojn de ĉiu leciono, por skribi siajn poemetojn. Se lernolibro ne estas uzata, proponu, ke la lernantoj mem kompilu liston de fundamentaj unusilabaj radikoj, dividante la taskon laŭ la kiomo da lernantoj: unu lernanto kompilas el litero A ĝis Ĉ; aliaj, de D ĝis G ktp. Poste oni faru kopion de la kompilaĵo por disdoni al ĉiuj.

* **Sepa paŝo**

Cele helpi la lernantojn, komence verku la unuajn kvar-kvin versojn, kvazaŭ temo-sugeston, por ke ili kompletigu la poemeton per plej taŭgaj vortoj el sia unusilaba vortstoko. Post tiu enkonduka trejno, instigu por ke ili mem verku tutajn unusilabajn poemetojn.

* **Oka paŝo**

Se la lernantoj diligente prilaboras hejme siajn unusilabaĵojn, ankaŭ vi plenumu vian parton, nome komentu pri iliaj provoj komence de ĉiu leciono. Kaptu la okazon, se necese, por atentigi pri la ĝusta uzo de prepozicioj. Kiel instigilon, trovu okazojn por rimarkigi pri bonaj uzoj de la afiksaro kaj aliaj vorteroj. Petu, ke ĉiu verkinto legu sian poemeton.



Post skribado de kelkdekoj da tiaj unusilabaroj, prizorgu kompiladon de plej interesaj poemetoj, kunligu ilin broŝurforme kaj faru kopiojn

por disdonado al ĉiuj lernantoj. Laŭoportune, prizorgu pli grandan kvanton da ekzempleroj de la broŝureto kaj aranĝu la disdonadon, kvazaŭ lanĉon, okaze de iu kluba aŭ kurseja evento.

TAKSADO

Eluzu unu lecionon por komuna taksado de la unusilaba antologieto. Starigu instigajn demandojn cele diskuti pri la produktado kaj interpretado de la poemetoj.

Pliajn specimenojn pri tia lingva eksperimento vi trovos en la retadreso <<http://www.ileibr.org/revuo/unusilaboj.pdf>>

NOVA 2010

Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO) proponas neformalan esperantan aranĝon nomatan NOVA. Per ĝi oni celas plifortigi la rilatojn inter la enlandaj junaj esperantistoj. La nomo de la aranĝo estas mallongigo por **Novjara Aranĝo** kaj estas inspirita en seminarioj kaj renkontoj fare de eŭropaj esperantistaj junuloj.

La unua aranĝo okazos en la tendumejo *Akvoj de Sankta Julia* en la urbo Charqueada, ŝtato Sanpaŭlo, de la 5-a ĝis la 9-a de januaro 2010. En la tendumejo estas naĝejo, sportejoj, akvofaloj, lago por fiŝkaptado i.a. Por pliaj informoj, portugale, vizitu la retejon de la tendumejo <<http://www.aguasdesantajulia.com>> kaj la retejon de BEJO <<http://bejo.esperanto.org.br/nova2010.html#obs>>.



<http://bejo.esperanto.org.br>

PLIRIĈIGU VIAN VORTOPROVIZON

La ĉi-numeran taksilon preparis Aleksandro Prado surbeze de *La Ŝtona Urbo*, romano de Anna Löwenstein, kiu aŭtoditakte lernis esperanton kiam ŝi estis 13-jara. Nuntempe ŝi estas membro de la Akademio de Esperanto kaj lanĉis novan romanon nomatan “Morto de Artisto”. Krom interesoveka, *La Ŝtona Urbo* estas leginda libro pro sia vortoprovizo bazita sur fundamentaj kaj oficialaj radikoj.



- Torĉ/o** – A: batalo en cirko kontraŭ taŭro; B: Dio de militoj ĉe skandinavo; C: granda, longtenila hakilo; Ĉ: bastono kies pinto estas bruligebla por estigi lumon.
- Buĉ/i** – A: sin prezenti unuafoje al la publiko; B: mortigi kiel oferon al diaĵo; C: praktiki sodomion; Ĉ: Mortigi brutojn por homa nutrado.
- Feĉ/o** – A: plej malestiminda parto de io; B: admiro-kulto al iu objekto aŭ persono; C: alnomo de grek-romana dio; Ĉ: fabela estaĵo dotita per supernaturaj povoj.
- Ŝal/o** – A: longa teksaĵo, kiun virinoj portas sur la ŝultroj ĝis la genuoj; B: speco de kapvesto; C: antikva veturilo tirata de bestoj; Ĉ: lana aŭ silka surŝultra tuko por virinoj.
- Broĉ/o** – A: malmultekosta pinglo-ornamaĵo; B: senvalora imitaĵo de oro, perlo k.s; C: bakita kuketo el vegetala pasto; Ĉ: florbrasika-simila legomo.
- Kribr/i** – A: krii kiel rabobirdo; B: rapide movi likvaĵon de unu ujo en alian; C: apartigi per ilo diversajn erojn de substanco; Ĉ: difekti al si iun parton de la korpo.
- Fask/o** – A: ago tiri fibrojn el fibroamaso; B: bakita kaj spicita kuirajo, kiun oni enmetas en mangaĵon; C: malsukceso; Ĉ: aro da samspecaj objektoj kune tenataj.
- Tremp/i** – A: malsekigi en likvo; B: lerte sin ĵeti en akvon; C: tiri post si ion. Ĉ: vagadi sen okupo kaj sen hejmeo.
- Gap/i** – A: bleki kiel anaso aŭ ansero; B: naive rigardadi kun la buŝo kaj okuloj malfermitaj; C: mispercepti; Ĉ: balbuti.
- Bran/o** – A: Ano de pastra kasto en hindua socio; B: alkohola distilata drinkaĵo; C: grenŝelo apartigita je la faruno per muelado; Ĉ: religia titolo en iuj aziaj landoj.

1. **Torĉo** – [Ĉ] Bastono kies pinto estas bruligebla por estiĝi lumon. [Opcio A = toreado]; [Opcio B = Toro]; “...prenis brulantan torĉon el la festofajro...” p.40
2. **Buĉi** – [Ĉ] Mortigi brutojn por homa nutrado. [Opcio A = debuti]; [Opcio C = bugri]; “Tiujn (porkoj) ni intencis buĉi por la festo...” p.40
3. **Feĉo** – [A] Plej malestiminda parto de io. [Opcio B = fetiĉo]; [Opcio Ĉ = Feo]. “...tiuj romanoj malŝparos siajn lancojn pro iu feĉulo...” p.41
4. **Ŝalo** – [Ĉ] Vasta, lana aŭ silka tuko, kiun virinoj portas surŝultre. [Opcio A = skarpo]; [Opcio C = ĉaro] “...estis firme volvita en ŝalo...” p.18
5. **Broĉo** – [A] Malmultekosta pingo-ornamaĵo. [Opcio B = straso]; [Opcio Ĉ = brokolo]. “...kaj franĝohava mantelo, kiun fermis broĉo...” p.27
6. **Kribri** – [C] Apartigi per ilo diversajn erojn de substanco. [Opcio A = kriĉi]. “Mi konsentis kaj trakribris mian cerbon, serĉante plian frazon...” p.54
7. **Fasko** – [Ĉ] Aro da samspecaj objektoj kune tenataj; [Opcio B = farĉo]. “...kiuj pretermarŝis nian heĝon portante faskojn de jam ŝpinita lano...” p.47
8. **Trempi** – [A] Malsekigi en likvo. [Opcio B = plonĝi]; [Opcio C = treni]. “...pli simple fari la boligadon kaj trempadon ĉe la riverbordo.” p.47
9. **Gapi** – [B] Naive rigardadi kun la buŝo kaj okuloj malfermitaj; [Opcio A = gaki]. “Venos vulpoj kaj musteloj (...), dum ni estos for, gapante al la fremduloj.” p.22
10. **Brano** – [C] Grenŝelo apartigita je la faruno per muelado. [Opcio A = Bramano]; [Opcio B = Brando]. “...por aldoni kelkajn manplenojn da brano...” p.47

Kontrolu vian memtaksadon:

Malpli ol tri trafaj respondoj: vi nepre bezonas legi iom pli.

3 – 4: **kontentiga**; 5 – 7: **bona**; 8 – 10: **bonega**

Stilo-evoluo ĉe Zamenhof

Floriano Pessoa



L. L. Zamenhof

Unu sama penso povas esti esprimata plurforme, laŭ la stilo de la aŭtoro, per frazoj grandaj aŭ etaj, propozicioj kunordigitaj aŭ subordigitaj, per vortoj simplaj aŭ kunmetitaj, modesta aŭ pompa vortprovizo – aranĝita laŭ kutima aŭ neordinara vortordo. El tiaj faktoroj rezultas, ke la teksto-senco jen tute klare montriĝas, jen estas nur pene divenebla.

Tre konata estas la ekzemplo, kiun Zamenhof mem prezentis por montri, ke en okazo de plena malobservo de la stilaj postuloj de iu lingvo, la teksto povas fariĝi tute nekomprenebla. Apendice al ĉi tiu artikolo, ni vidas leteron faritan de iu nova rusa esperantisto, kiu ne konis la esperantan stilon kaj simple laŭlitere tradukis la tekston el la rusa. Apude, la ĝusta traduko, farita de Zamenhof. Evidente, la mistradukita letero estas preskaŭ ne komprenebla.

Sed, plej ofte, la stilaj preferoj de iu verkisto, eĉ se ili ne plaĉas al la leganto, tamen ne ĝenas la komprenon de la teksto. En la Apendico ni donas du paralelajn tradukojn de rakonto de Boleslav Prus, faritajn de du eminentaj esperantistoj, la unua, fama poeto, kaj la dua, tre laŭdata proza stilisto. Ambaŭ estas ĝustaj kaj fidelaj, sed la teksto de Kabe ŝajnas pli “mallonga kaj viva” (kiel dirus Zamenhof) kaj, kvankam ĝi datiĝas de 1906, ĝi jam aplikas principojn de “neceso kaj sufiĉo” tiutempe ankoraŭ ne diskonigitajn. La traduko de Grabowski (pli ligita al Poezio) strebas al precizeco kaj tiucele uzas pli da afiksoj kaj kunmetaĵoj, kiuj faras la tekston iom pli peza.

Gramatika korekteco, klareco kaj harmonio karakterizas la stilon de Zamenhof tra lia tuta vivo. Aparte notinda estas lia kapablo serĉi la

ekvilibron inter du kontraŭaj postuloj, kiel li klarigas en ĉi tiuj citaĵoj el “Lingvaj respondoj”⁽¹⁾:

“La vera stilo esperanta estas nek slava, nek germana, nek romana; ĝi estas – aŭ almenaŭ devas esti – nur stilo simpla kaj logika”.

“Ofte (precipe en vivaj dramaj dialogoj), pli bona estas frazo ne tute logika kaj ne perfekte preciza, sed mallonga kaj viva, ol frazo perfekte preciza, sed enuige peza kaj tro kabineta”.

Por faciligi la komprenon kaj eviti pezecon, Zamenhof ŝpareme uzadis kunmetaĵojn — precipe plurradikajn — kaj konsilis: “Entute mi konsilas pli uzadi ĉiam formojn simplajn anstataŭ kunmetitaj. Kunmetado de vortoj estas karaktera eco de la lingvo germana, kaj al tiu ĉi lingvo ĝi efektive donas grandan riĉecon de formoj; sed en nia lingvo la vortoj pleje estas pli naturaj kaj pli bonsonaj, se ili estas ne kunigitaj, sed uzataj aparte”⁽²⁾.

Jen kelkaj ekzemploj:

“...malfermis EN LA PLENA LARĜO...” (anstataŭ PLENLARĜE), (“Marta”, p. 5) ⁽³⁾

“...EN ĈIU OKAZO”(anst. ĈIUOKAZE), [samloke 3]

“...DEZIREGO DE AMO”(anst. AMDEZIREGO), [samloke 2]

Plia trajto de lia stilo estas la uzado de adjektivaj subpropozicioj prefere al participoj:

“...kortoj KIUJ KUNTUŜIĜAS kun tiu strato” (anst. KUNTUŜIĜANTAJ), [samloke 3]

“...la konstruaĵo KIU STARIS en la profundo” (anst. STARANTA), [samloke 3]

“...la loĝejoj KIUJ TIE TROVIĜAS” (anst. TROVIĜANTAJ), [samloke 3]

Por certigi klarecon, precipe en longaj periodoj, Zamenhof ofte uzas parojn de interrilataj vortoj, ekzemple:

“...ĈAR la simila konstruo de la lingvo estas tute fremda por la eŭropaj popoloj, TIAL mi alkonformigis...”⁽²⁾

“...SE ĉiu balaos antaŭ sia pordo, TIAM en la tuta urbo estos ordo.”⁽²⁾

“...KIU regalias per ŝtonoj, TIUN oni dankas per bastonoj.”⁽²⁾

En interesa studo, Waringhien⁽²⁾ montras, ke eĉ en kompleksaj periodoj kun pluraj propozicioj, ĉe Zamenhof la klareco neniom perdiĝas, dank'al la ĝusta aranĝo de la frazmembroj.

Tiuj esencaj trajtoj de lia stilo konstante montriĝas en la verkoj de la aŭtoro de Esperanto.

Kaj proporcie kiel kreskis lia sperto kaj verkista lerteco, novaj progresoj ekaperis:

— Forigo de iuj arkaiĝintaj formoj: elrigardi (aspekti); la ambaŭ; vivu l'homaro; de troa senbezona uzado de JE; de stranga uzo de akuzativo (“koniĝi tiun ĉi lingvon”, “diligenta uzado ĝin”) — iam aperintaj en la inkunabloj de la internacia lingvo.

— Pli kaj pli kompleta liberigo de fremdlingva influo, ankoraŭ rimarkebla en iuj artikoloj de la Fundamenta Krestomatio, ekzemple en *“Al la historio de la provoj de lingvoj tutmondaj”*, kiun li tradukis el la germana.

Sed la plej grava faktoro influinta la riĉiĝon kaj maturiĝon de la stilo Zamenhofa estis lia giganta laboro por tradukado de majstroverkoj de la monda literaturo. Jen unu el liaj tuteklaraĵoj:

“...mia nuna maniero de tradukado, kiu ofte devigas min longe mediti pri tiu aŭ alia esprimo aŭ frazo...”

“... estas tre dezirinde, ke ni ne evitu malfacilajn tradukojn, sed kontraŭe, ke ni ilin serĉu kaj venku, ĉar nur tiamaniere nia lingvo plene ellaboriĝos...”⁽¹⁾

La tradukoj de Zamenhof riĉigis Esperanton per amaso da trafaj, vervaj, nemalhaveblaj esprimoj, kies studado, per si mem, valoras

kiel supera kurso de nia lingvo. Mi elektis dudek el la traduko de “Marta”⁽³⁾, (Apendico) por ke ni finu nian prelegon kun la sono de tiu pura, harmonia Esperanto ĉe niaj oreloj.

*Prelego prezentita okaze de la 44a Brazila Kongreso
de Esperanto en Juiz de Fora/MG julie 2009.*

BIBLIOGRAFIO:

1. Zamenhof, L.L. – “Lingvaj respondoj” Esp. Francaj eldonoj, 1962.
2. Waringhien, G. – “1887 kaj la sekvo”, Flandra Esperanto-Ligo, 1979.
3. Orzeszko, Elisa – trad. L.L. Zamenhof, “Marta”, Esp. Centra Librejo, 1928.

APENDICO

A. Letero de rusa komencanto

“Favora regnestro! Honoro havas alkuŝigi, kio laŭ kaŭzo de antaŭskribita al mi kun kuracisto kuraco mi en efektiva tempo ne en stato elpleni de donita kun mi al vi promeso; apud kio postaperigas, ke mi turnos sin al domo tra du monatoj, ne pli frue de fino de aŭgusto.”

B. Traduko de tiu letero fare de Zamenhof

“*Estimata sinjoro! Mi havas la honoron raporti al vi, ke kaŭze de kuracado, rekomendita al mi de la kuracisto, mi en la nuna tempo ne povas plenumi la promeson, kiun mi donis al vi; mi ankaŭ sciigas vin, ke mi revenos hejmen post du monatoj, ne pli frue ol en la fino de aŭgusto.*”

C. “La Ŝimo de l’ mondo” (el rakonto de Boleslav Prus)

Traduko de Grabowski (1904)

Okazis al mi esti en Pulawy kun certa botanikisto. Ni sidiĝadis ĉe la Sibilla sur benko, sub grandega ŝtono superkreskita de muskoj aŭ ŝimoj, kiujn de kelkaj jaroj esploris mia instruita kolego. Mi ekdemandis: kion interesan li trovas en rigardado de la neregulaj makuloj. Li ekrigardis min kun senkonfideco, sed konvinkiĝinte, ke li havas antaŭ si nespecialiston, li komencis klarigadi.

Li ekklinis la kapon por signo de l’ jesigo.

Traduko de KABE (1906)

Mi estis unu fojon en Pulawy kun botanikisto. Ni sidis en la ĝardeno sur benko, sub grandega ŝtono, kovrita de musko aŭ ŝimo, kiun mia klera konato esploris de kelke da jaroj. Mi demandis: kion interesan li trovas en la neregulaj makuloj... Li rigardis min nekonfide, sed konvinkite, ke li havas antaŭ si malklerulon, li komencis klarigi.

Li jese balancis la kapon.

D. Dudek Zamenhofaj esprimoj (El “Marta”)

... **forte** plimultaj...

... de la ŝtuparo konstante **deiradis** homoj...

... mahagona liteto... **alforgis al si la rigardon** de la patrino...

... fenestroj **scivole elrigardis sur la korton**...

... **rulon da monpaperetoj**...

... murojn de kiuj **blovis malsekecaodoro de kalko**...

... ŝi komencis **klopodi pri ordigo de la objektoj**...

... la **liton ŝi ordofaris per du kusenoj**...

... **elmetita al la volo** de la sorto...

... **de la kioma etaĝo** vi estas?

... fenestroj elirantaj sur rondoforman herbotapiŝe kovritan korton...

... en plena absoluteco...

... en senbordan solecon ĵetita virino...

... la homo... kurantaŭiĝis el la pelanta amaso...

... ŝi preterfrotadis la pasantojn ...

... la dispuŝataj pasantoj eĉ forflankiĝis antaŭ ŝi..

... ŝi enpikis la rigardon en la vizaĝon de la sinjoro...

... aperis ruĝaj makuloj. Tio estis sekvosignoj de varmego...

... salonon bruis, babilis, ridis dekkelke, eble eĉ kelkdek homaj voĉoj...

... disliberigitaj haroj.

Nova gvidantaro de ILEI

Okaze de la ĉi-jara Konferenco de ILEI en la pola urbo Krakovo, la 22-an de julio, elektiĝis nova ILEI-gvidantaro por la oficperiodo 2009-2012. La sep-membra estraro konsistas el jenaj nomoj: prezidanto **Stefan MacGill** (Nov-Zelando/Hungario), kiu respondecos pri *eksteraj rilatoj kaj kunordigo*; vicprezidanto **Ducan Charters** (Britio/Usono) okupiĝos pri *universitata agado kaj instru-teknologia evoluo*; sekretario **Małgorzata Komarnicka** (Pollando/Germanio); kasisto **Julija Batrakova** (Rusio/Nederlando); estraranoj **Radojica Petrović** (Serbio) zorgos pri *edukaj projektoj kaj informado*, **Zsófia Kóródy** (Hungario/Germanio) pri *ekzamenoj, Esperanto-centroj kaj instrukapablo*, kaj **Julián Hernández** (Kubo) pri *lerneja kaj landa agadoj*.

Pri la celaro proponata de la nova gvidantaro por la triajara agadplano, vizitu la retejon <www.ilei.info>.

Motivado en la instruado de Esperanto: kial tiom da fiaskoj?

Josias Barboza, *profesia Esperanto-instruisto*

Mi celas elstarigi ĉi tiun temon kiel la plej gravan demandon, kiun devas al si mem fari instruisto, antaŭ ol komenci la instruadon de iu ajna fremda lingvo.

De longe la esperanto-instruistoj alfrontas la demandon pri la kialoj de sia malsukceso en la instruado de la internacia lingvo. Kelkfoje la fiasko estas tiel evidenta kaj mezurebla, ke la honesta instruisto tion tuj ekkonstatas. Aliffoje la instruisto pave kaj parade transdonas atestilojn al sesono de la dekomencaj gelernantoj kaj aperigas fotojn en esperanto-gazetoj, sed interne, en la “subtegmento” de sia konscienco, li agnoskas kaj bedaŭras la ŝajnigon, ĉar li memoras tiun amaran momenton, kiam la atestil-ricevintoj eĉ du/tri salut- aŭ dank-vortojn ne kapablis elbuŝigi en esperanto, je la freŝa, kursfina momento mem.

Ne malofte la instruisto restas tutsole en la klasĉambro, atendante neniam aperontan kursanon. (Ironio! Tio jam okazis al mi trifoje en la komenco de mia instruista kariero!)

Ni starigu kelkajn fiask-indikajn demandojn:

Kiom da homoj komencis lerni esperanton en la lastaj 10 jaroj?

Kiom da ili ĝisfinis la kurson?

Kiom da tiuj lastaj efektive parolas esperanton? (la vera celo de la kursoj)

Kiom da ili engaĝiĝis en la laboro por la progreso de nia afero?

Kiom da ili aliĝis al la nacia kaj al la lokaj esperanto-asocioj?

Kiom da ili aĉetas kaj legas esperanto-librojn?

Kiom da homoj ricevis kapablo-atestilon, ĝin forĵetis kaj tute forgesis pri ĝi?

Kiom da tiuj ne pardonis al si la tempoperdon kaj nun propagandas malfavore al esperanto, dirante ke ili gustumis ĝin kaj pro tio ili rajtas aserti ke esperanto estas senvalorajo?

Inter la kialoj de la supraj indikiloj pri la evidenta fiasko elstarigas tiu de la ĉiam neglektata demando pri la **motivado** de la kandidato al

esperanto-kurso. Se tiu demando ne estas entute neglektata, ĝi estas plejparte devojigata al elpensitaj kaj tute nepravigeblaj motivoj, inter tiuj: “Esperanto estas tre facile lernebla, en malpli ol du/tri monatoj.”

Multajn aliajn **misajn** kialojn oni prezentas al la varbatataj ekstontaj esperantistoj. Vi, iam fiaskinta honesta instruisto, bone konas ilin.

En alian direkton, ni preferinde prezentu, miaopinie, la veran kaj nuran motivaĵon por lerni iun ajnan lingvon: La **bezono** ĝin lerni.

Ĉu esperanto estas bezonata lingvo por ordinaruloj? Ĉu vi instruonto kapablas pravigi vian jesan respondon? Vi strebu al tio. Vi certe trovos multajn **verajn** kialojn lerni esperanton.

Se ni instruistoj prezentus al kandidato al esperanto-kurso pragmatikajn uzojn por esperanto: ekzemple de la senpera allirejo al preskaŭ ĉiu kulturo de la terglobo, pere de la legado de libroj kaj periodaĵoj, la ebleco amikiĝi tutmonde perkoresponde kaj pere de Interreto, plus du aŭ tri pliajn **veraĵojn**, ni ne devojiĝus de la vero kaj ne alfrontus tiom grandan energi-perdon, ĉar ni tutcerte malkuraĝigus la revemulojn matrikuliĝi en niaj seriozaj kursoj, kaj allogus aliflanke seriozajn homojn al nia afero.

Alia pripensinda fiaskigilo estas tiu de la nepagendaj esperanto-kursoj. Laŭ la okcidenta mezuma pensmaniero, ĉio nepagenda estas senvaloraĵo. Se ni esperanto-instruistoj, post zorgema esplorado ĉe la lingvo-instrua merkato de nia urbo, postulus pagon, ekzemple de duono de la mezprezo, krom ne forpeli tiujn, kiuj ne povas multe pagi por lingva kurso, ni atingus, per nura pafo, pli ol unu celon: ni selektus tiujn, kiuj vere volas lerni utilan lingvon; ni devigus al ni instruistoj profesie kaj respondece studi trafajn instru-metodojn kaj serioze labori en la preparado de niaj lecionoj; ni ne elpoŝigus nian propran monon, ktp, ktp.

Jen, do, la proponataj ŝanĝoj: profesiigi la esperanto-instruadon; profesiigi la esperanto-instruistojn; honeste kontroli la rezulton de niaj kursoj, malsuprenveni el la konstruitaj revkasteloj; marŝi flanko-ĉe-flanke kun la **vero**, prezenti kiel nuran varbilon, utilajn uzojn por esperanto, samrange kun la plej konataj modernaj lingvoj, sed ne kiel sofismaĵo aŭ idealaĵo, atingebla nur post la morto.

Ĉu ni plialtigu nian instrukapablon?

Mendebila ankaŭ ĉe nia libroservo

R\$ 30,00
plus sendokosto

Titolo: “Cem Aulas Sem Tédio”

Aŭtoroj: Vanessa Amorim kaj
Vivian Magalhães

Lingvo: portugala

Eldoninto: IPR
(Instituto Pasto Reus)

Eldonjaro: 2008
(reproso de la 9-a eldono)

Bindo: kudre broŝurita

Formato: 232 p, 16 x 23 cm





EDUKADO.NET

INSTRUISTOJ,
NE IMPROVIZU!

ANTAŬ OL KOMENCI
VIAN LECIONON, VIZITU LA
LERNILARON DE EDUKADO.NET